



MAJO – SEPTEMBRO 1982
9-a JARO N-RO 2–3(26–27)

INTERNACIA LERNEJA
ESPERANTO-REVUO





Nemzetközi
eszperantó
diáklap

Megjelenik
évente háromszor

IX. évfolyam
82/2-3 szám

Felelős szerk.:
Princz Oszkár

Kiadja
a Magyar
Eszperantó
Szövetség
Budapest
Kenyérmező u. 6.
1081

Felelős kiadó:
Vaskó Tibor


Készült a
MESZ
Sokszorosítóban
84-0001

Kiad. eng. sz.:
III/IFJ/30/1976.
ISSN

0230-1318

*

TASKO
DE ĈIU
ESPERANTISTO:
PROPAGANDI
LA REVUON
INTER LA
KOMENCANTOJ!



Lando en kiu kun-vivas tri rasoj¹

Mult'eco de homaj specoj kaj de diversaj regionoj — verŝajne tiel oni povas plej trafe kaj plej koncize² pri-skribi landon, kiu estas laŭ sia grand'eco kvara en la mondo (8,5 milionoj da kvadrataj kilometroj).

Brazilo, kiel rimark'igis antaŭ kvar jardekoj en sia libro Vera Kelsey, estas miksa³ aĵo³ de historioj, religioj, ekonomioj, kulturoj, sangoj. Eŭrop'anoj, Afrik'anoj kaj unuaj en'land'anoj renkont'igis sur unu komuna tero kaj el-formis la brazilan popolon. Tiu ĉi miksa'igo estas daŭra kaj ĝi prezentas apartan kontribuon⁴ de la brazil'anoj al la monda kulturo.

Tamen, brazil'anoj estas unu'eca nacio, kiu vivas en unu komuna ŝtato, parolas unu komunan lingvon (la portugalan) kaj diversa'eco de de-veno de la ŝtata'anoj ne estas kaŭzo por apart'ig'emo.

La brazila kulturo form-igis en la batal'ado kontraŭ ras'ismo kaj nask'igis el la kun'igo de blank'uloj, negroj⁵ kaj indianoj. La negra sango fluas ne nur en la vejnoj⁶ de la en-land'anoj, sed ankaŭ en iliaj muziko, danco kaj en aliaj artoj.

Kiel skribis tre vaste kon'ata brazila verk'isto Jorge Amado, la ĉe-eston de Afriko kun ĝiaj sun-lumo kaj ombro sent'igas la profetoj⁷, sankt'uloj⁸ kaj anĝeloj⁹, kiujn formis skulpt'isto¹⁰ Aleijadinho (1730-1814) en la regiono Minas Gerais. La nigra afrik'ano kontribuis al ĉiuj grandaj atingoj de Brazilo.

1. vasta grupo de homoj kun la sama haŭto-koloro / 3. sen-orda kun-meto / 4. kun-helpo, kun-laboro / 5. nigr'uloj / 6. en kiu fluas la sango / 7-9. religiaj est'uloj / 10. kiu formas objektojn, ekzemple el ŝtono.

FINO DE

Estis ne-ordinara varm'ego kaj ĝis la foir'ejo¹ estis pli ol unu kilometro kion mi povis fari? Mi nur ŝajn'igis rid'eton kaj diris:

– Bone. Mi tuj iros kaj acetos tiujn semojn.² Kaj morgaŭ mi semos ilin en la ĝarden'eto...

– En kvar vicoj – cert'igis sin la patr'ino.

– Jes, en kvar vicoj – kaj mi peze ekspiris por montri, kiel multe-kosta estas por mi tiu promeso.

Ĉe la for-iro mi aŭdis ankoraŭ la voĉon de mia patro:

– Demandu ĉe Derda pri Rufa...

La urbo estis sen-homa, silenta pro la varm'ego. Mi promenis kaj pensis pri diversaj aferoj. Mal-sukcesa ferio. Pli bone estus resti en vilaĝo ĉe la onklo. Mi re-ven'is tute super-flue, meze de julio, kaj ĉiuj knaboj jam certe for-veturis, kion fari sola tie ĉi...

Ĉe mal-juna Derda mi eĉ nenion devis diri. Li re-donis al mi kolombon³ kaj diris:

– Ligu ĝin aŭ vendu ĝin al mi, ĉar ĝi ĉiam emas rest'adi kun miaj kolomboj.

Mi re-venis laŭ alia vojo, preter la kin'ejo.⁴ Kolombon mi en-igis sub la ĉemizon⁵ kaj tenis ĝin per la mano. Kaj per la alia mi ĉirkaŭ-premis sak'eton kun semoj.

Ek-blovis⁶ mal-forta vent'eto kaj mi far'igis pli gaja.

Mal-facile diri, kiel tio okazis. Subite mi ek-aŭdis, ke io forte bremsas⁷ kaj preskaŭ



LA FERIO

samtempe io batis mian dorson. Tiam Rufa ek-flugis supren. Mi ek-sentis doloron kaj ion dolĉan, kvazaŭ mi havus buŝon plenan de sukero.

Kiam tio pasis, montr'igis, ke mi sidas sur la ir-vojetoj kaj meze de vetur'ejo lev'igas iu knab'ino. Tuj apud mi kuŝis ŝia biciklo, la antaŭa rado ankoraŭ turn'igis. La knab'ino estus mal-feliĉa kaj tute griza de polvo.⁸ Ŝi tenis sian genuon.

Mi rimarkis, ke ankaŭ mia mano estas sanga.

Ni ambaŭ levis nin en la korto malantaŭ la kin'ejo kaj dum tio silentis. Ŝi komencis kombi sian har'aron. „Tre bela knab'ino” – pensis mi kaj samtempe mi ege miris. Neniam antaŭe mi rimarkis, ke iu knabino estas bela. Kaj tamen ek de la unua klaso ni lern'adis kune kaj multe da ili mi konis. Tiu ĉi estis tute fremda al mi. Ŝi havis blondan⁹ har'aron kaj longe ĝin kombis kvazaŭ por montri, kiel bela tiu har'aro estas. Ŝi tute ne rigardis min. Mi ek-koleris.

– Ĉu vi donos al mi fin-fine tiun komb'ilon? Kiom longe oni povas kombi sin? Kaj se ankoraŭ-foje vi sur-veturos min, mi tiel frapos vin, ke... Aŭ mi ĵetos vin en lag'eton!

La knab'ino rid'etis kaj re-donis al mi la komb'ilon.

– Ĉu vi kutimas bani vin en la lag'eto?

– Kia demando! Kaj?

– Nenio. Kaj mi petas pardonon. La rado for-kuris.

– La rado for-kuris kaj Rufa for-flugis – mi diris kolere. Kaj la semoj ankaŭ.

Ni iris mal-rapide, ĉar ŝin doloris la piedo. Apud mia domo mi haltis kaj diris:

– Tie ĉi mi loĝas...

Mi ne scias, kial en-tute mi diris tion. Nur por ion diri.

Ŝi donis al mi la manon kaj de-nove rid'etis.

– Se tio interesas vin, mia antaŭ-nomo estas Elizabeta.

– Ege min tio interesas. Vi certe pensis, ke mi mortas pri sci-vol'emo, ĉu ne?

Subite mal-granda Jozef Zimek, kiu sidis proksime kaj rigardis nin, komencis krii:

— Julek kun fraŭl'ino! Julek kun fraŭl'ino!

En la fenestro aperis la mal-juna Repiŝevska. Mi sentis, ke mi ruĝ'igas. Mi estis koler'ega.

— Silentu, vi naz-muk'ulo,¹⁰ ĉar mi en-fermos vin...! kri'egis mi kaj li ĉesis.

— Ĉu via nomo estas Julek? — demandis Elizabeta.

— Ne. Tiu bubo¹¹ ne sci-povas el-paroli „r”. Saluton! — mi turnis min kaj iris hejmen.

Trad.Z.Lepieszkiewicz
Adaptis -ok-

1. loko por vend'adi aŭ aĉet'adi / 2. El kio kreskas floro aŭ frukto / 3. birdo / 4. kie oni prezentas filmojn / 5. vesto / 6. movi aeron / 7. halt'igi aŭ mal-rapid'igi mov'iĝon de vetur'ilo / 8. tre mal-grandaj eroj, kiuj kovras objektojn / 9. hele-flava / 10-11. mal-granda, sen-sperta knabo.





KIEL ĜI EVOLUIS¹

La ideo de inter-nacia lingvo ne estas produkto de la lasta tempo – jam en la mal-novaj tempoj oni sentis la valoron de komuna lingvo. En Biblio oni rakontas, ke iam la tuta mondo havis unu lingvon kaj ke la nuna mult-lingv'eco estas puno² de Dio.

Sia-tempe kelkaj naciaj lingvoj, ekzemple la greka kaj latina, ludis parte la rolon³ de inter-nacia lingvo. Sed ilia dis-vast'iĝo estis dank'inda al ŝtata potenco,⁴ kaj kiam mal-fort'iĝis aŭ falis la ŝtato, mal-aperis ankaŭ ĝia lingvo.

La unuaj, kiuj ek-pensis serioze pri arte-far'ita mond-lingvo, estis la grandaj pens'uloj Bacon, Comenius, Descartes kaj Leibnitz. Kon'ataj estas ĉirkaŭ 300 projektoj⁵ de arte-far'ita lingvo, kiujn ni povus dividi⁶ je tri grupoj:

1. Lingvoj plene el-pens'itaj.
2. Lingvoj kre'itaj laŭ la ekzist'antaj lingvoj, sed grand-parte el-pens'itaj.
3. Lingvoj konstru'itaj laŭ la naciaj lingvoj.

Al la unua grupo ni kalkulas ekzemple la muzikan lingvon Solresol de F.F.Sudre el la jaro 1866. En Solresol ĉiuj vortoj estas kre'itaj el sep muzik-notoj.⁷ Jen, kelkaj ekzemploj: si (jes), do (ne), re (kaj), dore (mi), domi (vi), dofa (li), redo (mia), remi (via), refa (lia), doreda (tempo), doremi (tago), dorefa (semajno), doresol (monato), dorela (jaro), misol (bono), solmi (mal-bono). Tiun ĉi lingvon oni povis ne nur skribi kaj paroli, sed ankaŭ kanti kaj ludi helpe de muzik'ilo.

La plej kon'ata el la lingvoj de la dua grupo estas Volapük, kiun kreis Johann Martin Schleyer en la jaro 1879. Ĝi estas tute arte-

far'ita: lofon (ami), lofob (mi amas), lofobs (ni amas), alofob (mi amis), alofof (ŝi amis), olofols (vi amos), k.t.p. La vortoj estas pren'itaj ĉefe el la angla, parte ankaŭ el la latina, germana kaj franca lingvoj, sed ili estas tiel ŝanĝ'itaj, ke plej ofte estas tute ne-eble re-koni ilin. La nomo de la lingvo devenas⁸ el la anglaj vortoj *world* (mondo) kaj *to speak* (paroli).

Jen, la preĝo Patro nia en Volapük:

„O Fat obas, kel binel in suls, paisaludomoz nem ola! Komomod monargan ola! Jenomoz vil olik, as in suls, i su tal! Bodi obsik vadeliki givelos obes adelo! E pardlos obes debis obsik, as id obs aipardobs debeles obas. E no obis mindukolos in tentadi; sod aidalivolos obis de bad. Jenosod!”

El ĉiuj arte-far'itaj lingvoj, aper'intaj antaŭ Esperanto, Volapük havis la plej grandan sukceson, kaj plej multe dis-vast'igis. En la jaro 1889 ekzistis 283 volapük'istaj grupoj kaj 25 gazetoj, lerno-libroj en 25 lingvoj. Hodiaŭ Volapük estas nur historio.

Laste venas la lingvoj krei'taj laŭ la ekzist'antaj naciaj lingvoj, ekzemple Esperanto, Ido, Occidental, Novial, Interlingua, Idiom Neutral kaj aliaj. Ili efektive ne estas artefar'itaj kiel Volapük, sed estas similaj kiel la naciaj lingvoj, el kiuj ili estas kun-met'itaj.

El tiuj ĉi lingvoj plej multe dis-vast'igis krom Esperanto Ido (1908), kiu estas speco de ŝanĝ'ita Esperanto. Tamen, ĝi neniam dis-vast'igis same kiel Esperanto. Praktikan⁹ valoron en nia tempo havas sole Esperanto, kiu estas dis-vast'igita mult-oble pli ol ĉiuj arte-far'itaj lingvoj kune. La praktiko montras, ke per Esperanto la mond-lingva problem¹⁰ povas esti solv'ita.¹¹

*

Tamen, ne sufiĉas krei novan lingvon. Miloj da ili povas konstru² iĝi, unu pli bela, riĉa kaj facila ol la alia... Sed se iuj provos fari tion sen havi antaŭ siaj okuloj la finan celon... la kaoso¹² ne mal-aperos, sed konstante daŭros.

(Comenius en Panglotio)

1. iom post iom kresk'adi / 2. sufero pro ago, kiu ne estas far'inda / 3. kion oni atendas fari de iu aŭ io / 4. forto / 5. plano, propono / 6. apart'iĝi / 7. laŭ kio oni ludas aŭ kantas / 8. estas el / 9. por esti uz'ebla / 10. demando / 11. trovi la respondon al demando / 12. mal-ordo.

Preskaŭ en ĉiuj ŝtatoj de la mondo ekzistas krom la ĉefa ankaŭ aliaj lingvoj, kiujn uzas mal-pli grandaj nacioj aŭ nur mal-granda nombro de ali-naci'anoj. La diferenco povas esti diversa — laŭ tio oni parolas pri pluraj oficialaj¹ lingvoj, aŭ pri la nacia mal-pli-multo (se la diferenco inter ĝi kaj la ĉefa nacio estas granda).

Fakte, la lingvoj de la grandaj nacioj estas ĉiam avantaĝaj,² ĉar la mal-grandaj lingvoj ne sukcesas akcept'iĝi en inter-naciaj rilatoj. Krome, la lingvojn de la mal-pli-multoj oni kutime uzas nur sur tre mal-vasta teritorio³ kaj la ŝtato ne ĉiam dediĉas sufiĉan atenton al ilia instru'ado kaj fleg'ado.⁴ Iujn tiajn lingvojn ni konas nur en parola formo. Aliaj for-mortas rekte antaŭ niaj okuloj, ekzemple la retoromanĉa en Svisio aŭ la kimra en Britio.

Iuj lingvoj re-nask'iĝis dank' al politikaj ŝanĝoj, ekzemple la kataluna en Hispanio.

Makedona lingvo estas mem-stara kaj oficiala en Jugoslavio, dum en Bulgario oni rigardas ĝin dialekto⁵ de la bulgara. Simile iuj parolas pri la valona lingvo, dum la aliaj ĝin opinias dialekto de la franca... Ali-flanke, la lingvon de ciganoj neniu flegas, en ĝi preskaŭ ne aperas libroj aŭ gazetoj.

-jch-

1. pri kies uz'ado decidas la ŝtato / 2. kio donas pli grandan utilon / 3. parto de lando, regiono / 4. pri-zorg'ado / 5. speciala formo de iu lingvo en certa regiono.

RENKONT'IGĖ

Estis jam mal-helo. Nur mal-granda lampo¹ sur la skribo-tablo lumis. En la ĉambro estis du mal-hel-ruĝaj foteloj,² mal-granda tablo, kelkaj seĝoj kaj tri grandaj brunaj libro-ŝrankoj.³ Ĉiuj plenaj de libroj. Pri-lingvaj verkoj, vort'aroj, lerno-libroj rusaj, polaj, latinaj,



francaj, germanaj, anglaj estis en unu ŝranko. En la dua ŝranko estis libroj de nun-tempaj verk'istoj, sed ankaŭ mal-novaj grekaj kaj hebreaj verkoj. En la tria libro-ŝranko estis kurac'istaj libroj.

Ĉe la skribo-tablo sidis viro kun okul-vitroj kaj skribis. La tablo estis plena de manuskriptoj.⁴

Iu frapis la pordon, sed la viro kun okul-vitroj ne ĉesis skribi. Oni frapis de-nove. Nur nun li levis la kapon.

„En-iru!”, li diris. La vizit'anto mal-fermis la pordon.

„Mi serĉas sinjoron Ludovikon Lazaron Zamenhof”, li diris Esperante.

„Estas mi”, diris la viro ĉe la tablo kaj lev'iĝis. Sed kiu estas vi? Vi ja parolas Esperante.”

„Mi estas Grabowski, Antoni Grabowski”, respondis la fremd'ulo.

„Sed kiel, kie kaj kiam vi el-lernis mian lingvon?”, demandis Zamenhof kun interes'iĝo.

„Tuj kiam mi ricevis vian lerno-libron”, diris Grabowski.

„Ĉu vi estas polo?”

„Jes, mi estas polo kaj mi parolas tridek lingvojn, sed neniu el ili estas tiel facila kaj logika⁵ kiel Esperanto.

„Ĉu vi scias, ke vi estas la unua, kun kiu mi parolas Esperante? Bonvolu sidiĝi!”

„Koran dankon”, respondis Grabowski kaj ili ambaŭ sid'iĝis. Juna vir'ino al-portis teon⁶ kaj dolĉ'aĵojn.

La du viroj longe kaj ĝoje parolad'is. Poste ili ek-staris kaj iris al la libro-ŝrankoj. La libroj estis ĉie — sur la tablo, sur la seĝoj, eĉ sur la planko.

Tra la fenestro oni povis vidi ankoraŭ lumon, sed la ĉielo jam hel'iĝis.

1. lum'ig'ilo / 2. granda mola seĝo / 3. ujo por diversaj objektoj / 4. per-manaj skrib'aĵoj / 5. klare kompren'ebla / 6. ĉiu-taga trink'aĵo.

LA RUBRIKON¹ GVIDAS

Josef Cvosta (:ĥvosta)
Engelsova 289,
CS-290 01 PODĚBRADY
Ĉeĥoslovakio

Sendu ĉiun korespondajon
rekte al tiu adreso!



(*Kapo de X.Y.*) – Helpu lin kalkuli, kiom da homoj vivis ĝis nun sur la tero. X.Y. kalkulis jene: la hom'aro vivas sur la tero proksim² ume 6000 jarojn, do eble ek-de mal-kovro de la skribo, la homa vivo daŭris ekz. 80 jarojn, la nombro de homoj de unu generacio¹ estas 2 000 000 000.

Jen la unua maniero: 6000 jaroj : 80 jaroj = 75 generacioj. Do oni obl'igas $75 \times 2\,000\,000\,000$, tio estas 150 000 000 000. Certe sufiĉe ne-kred'ebla : sur la tero ankoraŭ ne vivis 1 000 000 000 000 da homoj. Tiun nombron oni nomas ie biliono. Oni notas ĝin ankaŭ 10^{12} :legu dek potenc'ig'ita dek-du-oble, do $10 \times 10 \times 10 \times 10 \times 10 \times 10 \times 10 \times 10 \times 10 \times 10 \times 10$.

La alia maniero: unu homo havas du ge-patrojn, kvar ge-avojn, Ek-estas tiel nom'ata geometria progresio: 1 2 4 8 16 32 64 128 ktp: Kaj tiu ĉi progresio okazas kun 75, ĉar estas 75 generacioj. Oni povas el-kalkuli kaj la lastan 75an membron de la progresio kaj la sumon de ĉiuj 75 membroj. La sumon oni ricevas, se oni obl'igas la nombron 2 en-tute 75-foje. Do: 2 potenc'ig'ita 75-oble (2^{75}). La fina numero havas 23 ciferojn² (proks. 37 000 000 000 000 000 000 000). Sed temas nur pri antaŭ-uloj de unu homo, do necesas obligi ĝin per 2 000 000 000. Proksim'uma rezulto³: 74 000 000 000 000 000 000 000 000 000 000 000, koncizè 74×10^{30} .

Kiu povas klar'igi al X.Y., kial la rezultoj ne estas proksim'ume samaj, kvankam la diferenco⁴ inter ili estas simila kiel inter punkto kaj ter-globo...? ⁵

1. tuto de la proksim'ume sam-aĝaj homoj / 2. kutima skribo de nombro / 3. tio, kio sekvas el io / 4. kio ne estas sama aŭ simila / 5. tut-mondo.

ĈEVALO

Se iam mi far'ig¹os riĉa, mi aĉetos ĉeval'idon. Mia domo staros sur bel'ega loko. Ĝi ne estos tro granda, sed komforta.¹ De tie estos el-vido al rivero aŭ la lago kaj montoj. Ĉio estos tre bela en tiu domo. Estos ankaŭ ĝardeno kun altaj arboj, kaŝ'itaj benkoj.

Tie mi loĝos. Ĉirkaŭ la domo, mal-antaŭ la ĝardeno, estos paŝt'ejo.² Tie vivos mia ĉevalo.

Mi ne sci-povas rajdi,³ eĉ mi ne volas el-lerni tion. Ne volas mi sidi sur dorso de alia viv'aĵo. Mi bezonus tiun ĉevalon por fari ĝin libera. Ĉiuj ĉevaloj de mil-jaroj estis mal-liberaj, se ili vivis kun la homoj. Sur ĉiujn oni sid'igis, ĉiujn oni en-jugis.⁴

La mia de-naske vivus libere. Tut-tage ĝi nur paŝt'adus sin, kurad² us kiel ĝi volus. Ĉi-matene mi irus al ĝi, al-parolus, karesus⁵ ĝin. Mi scias, ke kelk-foje min ek-kaptus la deziro, kiam mi vidus ĝian larĝan, fortan dorson. Tamen mi ne sidiĝus sur ĝin.

Por ke ĝi povu ami min, rigardi per brilaj okuloj, kisi⁶ mian suker-havan manon per la plej mola buŝo de la mondo...

Se ĝi ek-vidos min matene sur la herb'ejo, ĝi al-kur'egos, kun rido kaj kun sia flug'anta⁷ kol-har'aro.

Ĝi amos min. Ĝi estos mia amiko.

1. kio igas la viv'adon pli facila / 2. herb'ejo aŭ kampo, kie oni manĝ'igas bestojn / 3. sidi kaj sam-tempe iris sur la dorso de la besto / 4. ligi, mal-liber'igi / 5. facile tuŝi por montri amon, amik'econ / 6. tuŝi per la buŝo / 7. kiu flugas.



Sándor Weöres

Êi êeval' êu ne laüd'indas?

Êi êeval' êu ne laüd'indas? ¹
Êiu-paše ġin bril' vindas. ²
Ģi similas je kur' vento,
ġi superas je prez' ³ centon.

Se êeval' mia danc⁴-iras,
sur êiel' êiu stel' miras.
Se êeval' mia ek-saltas
mem la sun' pro mir'eg' haltas.

Trad. A.Hules

Primavera kanto

Unu, du, tri, kvar, jen,
kapreolo,⁵ vi kien?
– Ne ĝenu⁶ vin ĉi afer'
kuras mi por primaver'!⁷

Unu, du, tri, kvar, jen,
lepor'eto,⁸ vi kien?
– Nek arb'aron, nek riveron,
atendi la primaveron!

Unu, du, tri, kvar, kvin,
bird'eto, ho distru⁹ nin:
flugu kanto al aer',
pli bela ol primaver'!

Trad.M.Fejes



ALTE

— Kion vi serĉas tie ĉi, inter la nuboj? — demandis aglo¹⁰ alaŭdon,¹¹ kiu gaje kantis. — For'igu! Kiu nask'igis sur la tero, restu tie. Tie ĉi, alte, estas la mondo de la agloj!

La alaŭdo respondis:

— Vi ne pravas. La libera aero ne estas nur por la agloj, sed por ĉiuj birdoj, por ni ĉiuj. Ĝi estas do ankaŭ la mia. Ni ne demandu, kiu kie nask'igis, ĉu alte aŭ sur la tero, sed kien iu povas flugi per propraj flugiloj.

1. kio meritas bonan opinion / 2. ĉirkaŭ-volvi / 3. valoro / 4. mov'igi, ekz. laŭ muziko / 5. arb'ara besto simila al cervo / 6. mal-trankvil'igi / 7. printempo / 8. besto kun longaj oreloj kaj longaj postaj piedoj / 9. amuzi / 10-11. granda kaj mal-granda birdoj.

KIAL SIMIO HAVAS MAL-LONGAN VOSTON

(mal-nova japana rakonto)

Iam, antaŭ longa, longa tempo la vesto¹ de simio² mezuris ĉirkaŭ 33 klaftojn.³

Iun tagon ĝi vizitis la urson⁴ kaj demandis, kia-maniere ĝi povos kapti multe da fiŝoj el rivero.

La urso diris al ĝi:

„En mal-värma nokto sid'igu vin sur la rokon⁵ kaj lasu vian voston en la akvo. Certe multaj fiŝ'etoj venos kaj fik's'igos al ĝi.

La simio tre ĝojis kaj faris tiel, kiel konsilis al ĝi la urso. Kiam venis profunda nokto, la vesto far'igis pli kaj pli peza. Tio estis pro tio, ke la akvo glaci'igis. Sed la simio pensis, ke la vosto estas peza pro multaj fiŝoj.

„Se mi jam kaptis tiom da fiŝoj, tiam sufiĉe. Estas jam tre-ege mal-varme kaj mi re-iros hejmen”. Tiel pensis la simio kaj ĝi volis el-akv’igi sian voston. Sed tio ne estis ebla.

„Ha, terure!” La simio ek-timis kaj tiris la voston tiel forte, ke ĝi dis-sir’iĝis.⁶

Oni diras, ke la vizaĝo de la simio estas tial ruĝa, ĉar ĝi tiris la voston per sia tuta forto.

1. korpo-parto ĉe la post’aĵo de la besto / 2. Besto plej simila al la homo / 3. Klafto=ĉ.2 metroj / 4. granda har’ara besto / 5. ŝton’ego / 6. dis-pec’iĝis



Laŭ propra deziro

Sinjoro Adek renkontas sinjoron Bol

A: Bonan matenon, sinjoro Bol!

B: Bonan matenon, sinjoro Adek!

A: Ĉu vi fartas¹ bone?

B: Ne tute bone. Sed iom pli bone.

A: Estas bone, ke vi fartas pli bone.

B: Certe... Sed estus pli bone, se mi fartus bone!

A: Kompren'eble. Tio estas vere hazardo.²

Hazardo? ... Kial?

A: Ĝus antaŭ unu minuto mi renkontis vian edz'inon.

B: Kie vi renkontis ŝin?



- A: Antaŭ la magazeno³ INNO.
 B: Se ŝi en-iris, ŝi restos tie almenaŭ unu horon.
 A: Ĉu vere?
 B: Jes. Sen-dube. Mi konas bone mian edz'inon.
 A: La mia estas tute sama.
 B: Nu, oni ne povas ŝanĝi tion. Jen, prenu cigaredon! ⁴
 A: Dankon. Mi ne plu fumas.
 B: Ĉu vere? De kiam?
 A: Jam de unu semajno.
 B: Mi gratulas⁵ vin.
 A: Ne gratulu tro frue!
 B: Ĉu vi el-tenos tute ne plu fumi?
 A: Eble ne mi. Sed certe mia edz'ino...!
 B: Ĉu mi ridu? ... Aŭ ĉu mi kompatu vin? ...
 A: Neniĝa kaŭzo en la nuna momento. Atendu ankoraŭ kelke de semajnoj!
 B: Bone, bone. Mi invitas vin trinki glason da biero.⁶
 A: Matene mi ne ŝatas trinki bieron.
 B: Nu, vi povas trinki ion alian: kafon, teon⁷ aŭ konjakon...⁸
 A: Eble mi povus preni frukto-sukon.⁹
 B: Estas egale. Vi trinkos, kion vi volos. Venu!
 A: Bone. Tie proksime estas mal-granda kaf-ejo.
 B: Mi proponas¹⁰ iri en la novan kaf'ejon ĉe la fer-voja stacio.
 A: Mi ne konas ĝin. Mi ne estis tie ankoraŭ.
 B: Vi vidis, ke ĝi estas agrabla trink'ejo.
 A: Ĉu luksa?¹¹
 B: Tute ne. Sed tre moderna.¹² Kaj la pri-servo estas bon'ega.
 A: Tio ŝajnas interesa. Do, ni iru! Sed mi povos resti nur dek minutojn.
 B: Kial vi ne povas resti pli longe?
 A: Ĉar antaŭ la deka horo mi devos iri al la kurac'isto.
 B: Kiel vi deziras. Vi estas libera fari laŭ via volo.

A.Lienhardt

1. senti sin / 2. kion oni ne antaŭ-vidis / 3. vend'ejo / 4. objekto por fumi / 5. esprimi al iu kontenton pro lia sukceso / 6.-9. diversaj trink'afoj / 10. prezenti al ies juĝo / 11. brila / 12. nun-tempa

PROVERBOJ


Por en-amiĝ ¹ into Bagdad ne estas mal-proksima	(turka)
Por kio oni huf-ferus ² hundon?	(korea)
En put ³ la rano ⁴ ne scias pri la oceano ⁵	(ĉina)
Lum'ingo ⁶ sian bazon ⁷ ne pri-lumas	(araba)
Korva ⁸ mal-beno ⁹ ĉevalon ne mort'igas	(brazila)
Grand'egaj estas la kornoj ¹⁰ de la trans-maraj bovoj ¹¹	(el Tahitio)

1. popolo la dir'aĵo / 2. al-igi fer-pecon al piedo de la besto / 3. profunda truo / 4. verd-kolora besto viv'anta en star-akvoj / 5. maro / 6. ujo por lum'ilo / 7. mal-supra parto de objekto / 8. birdo / 9. voli mal-feliĉon por iu / 10. el-star'aĵo sur la kapo de la besto / 11. granda hejm-besto, kies ino donas lakton.

KION DIRAS AL NI ANTIKVAJ¹ BILDOJ

Bildoj, kiujn faris la homo antaŭ multaj jar-miloj, tre bone montras lian ĉefan okupon. Laŭ ili ni povas ek-scii, kiajn bestojn niaj antaŭuloj ĉas'adis² kaj kiaj estis iloj por tiu ĉi ag'ado. La ĉefa materialo³ por fari tiun ĉi il'aron estis ŝtono kaj dum la ĉas'ado ĉefe help'adis la fajro.

La homo sin vestis per pelto,⁴ konstruis tre simplajn loĝ'ejojn ordinare sub la tero aŭ en la groto.⁵ La bildoj en tiuj ĉi lokoj havis apartan rolon⁶ kaj gravecon — ili servis por cert'igi sukceson de la ĉas'isto. La malnova art'isto volis per ili prezenti al si tion, kio en tiu momento ankoraŭ ne estis efektiva. La bildo estis kvazaŭ helpo



antaŭ la tre mal-facila tasko,⁷ ĉar la iloj de la homo estis tro simplaj kaj la besto estis pli forta.

La bildo sur la ŝtona muro estis ne nur konat'igo kun la besto, sed sam-tempe ankaŭ peto, por ke la besto venu kaj lasu sin mort'igi, ĉar la bona ĉas'aĵo egalas mang'aĵon kaj vivon. La mal-nova arto montras al ni la viv- kaj pens-manieron de la tiamaj homoj, kiu kun la besto, kiu donacis la vivon, inter-parolis pere de la bildo.

Bildo en la groto parolas pri tio, ke la homoj kredis ekziston de super-natura est'aĵo. Ili montras ankaŭ la komencon de la religiaj imagoj⁸ pri la mondo.

Tiu ĉi mal-nova arto estas sam-tempe ia bildo-skribo. Se ni deziras tra-legi ĝin korekte,⁹ tiam ni devas tra-senti la vivon de la tiamaj homoj kaj ek-koni la forton de lia labora il'aro, per kiu li volis sub'igi al si la naturon, kaj kio montris ne nur lian forton, sed mult-foje ankaŭ mal-forton.

Sen-povo de la homoj rilate al la naturo daŭre mal-grand'igis, kiam lia il'aro iĝis pli perfekta¹⁰ kaj kiam pri ĝia el-pens'ado komencis okupi'igi la scienc'istoj.¹¹

1. mal-nov'egaj / 2. kapt'adi / 3. el kio oni faras ion / 4. har'ara sur-hav'aĵo de la besto / 5. sub-tera ejo / 6. eco por el-uzi / 7. kion oni devas fari / 8. kredo pri super-naturaj est'uloj / 9. ĝuste / 10. sen manko / 11. kiu havas vastajn sciojn pri io

KANTU!

Usona popola kanto

CERTE VENKOS¹ NI

Vigle

1. Certe venkos ni, certe venkos
ni, iam certe venkos ni,
Rf.
Ho, krias la kor, jes kredas
mi, iam certe venkos ni.

2. Ni ne timas plu, ni ne timas plu,
nun jam ni ne timas plu.
3. Kune marŝos ni, kune marŝos ni,
nun jam kune marŝos ni.
4. Pacon gajnos ni, pacon gajnos ni,
iam pacon gajnos ni.

TENDAR-FAJRO²

(ĉen³-kanto)



Jam ruĝetaj brilas flamoj, jam ruĝetaj



brilas flamoj, fajro, fajro, kolorigas



vangojn manojn, kolorigas vangojn manojn

1. superi mal-amikon / 2. kio brulas okaze de komuna kant'ado ktp. /
3. oni kantas ĝin sin-sekve / 4. brilo el aĵo, kiu brulas / 5. parto de la homa vizaĝo.

SIMILAJ KAJ TAMEN TUTE MAL-SAMAJ

Bru	—	aŭd'igi fortajn sonojn
bruli	—	neni'igi pro fajro
ĉasi	—	kapt'adi bestojn
ĉesi	—	komenci ne esti
horo	—	dudek-kvara parto de la tago
ĥoro	—	kant'ista grupo
kompreni	—	havi ĝustan ideon pri io
kun - preni	—	preni kune
majstro	—	el-stare lerta pri io
mastro	—	kiu havas
metro	—	mezur'(il)o
metroo	—	sub-tera fer-vojo
post'aĵo	—	mal-antaŭa parto (ekz. de la korpo)
poŝt-aĵo	—	kion oni sendas per poŝto
roso	—	pec'et'oj da akvo ekz. sur floroj
rozo	—	floro
serĉi	—	voli trovi
ŝerci	—	ne-serioze paroli
tusi	—	el-spir'egi
tuŝi	—	meti la manon sur ion
vesto	—	ĉio, per kio oni vestas sin
veŝto	—	vira brust-vesto

MATENA BANO

Estis frua, tre varma julia mateno. Nokte pluvis. Sen-arba mont'eto vapolis, sed interno de la roko¹ estis tute mal-seka. Ĉiuj koloroj iĝis pli vid'ebraj. Kresk'aĵoj apud la domo similis al iu ne-kutima arb'aro. Av'ino serĉis ion inter ili. Ŝi devis esti tre sin-garda por ne rompi ilin.

– Kion vi faras? – demandis mal-granda Sofia.

– Nenion – respondis mal-jun'ul'ino. – Tio estas – ŝi al-donis kolere – mi serĉas mian arte-far'itan dent'aron.

La knab'in'eto mal-supren-iris de la pordo kaj demandis:

– Kie vi perdís ĝin?

– Tie ĉi – montris la avino. – Mi staris tie ĉi kaj ĝi falis ien inter la florojn.

Ili komencis serĉi komune.

– Lasu min tie ĉi – diris Sofia. Vi ne kapablas jam stari.

Kaj ŝi en-iris en tiun flor-arb'aron. Estis tie agrable kaj interese. Kaj kuŝis tie dentoj, blankaj kaj ruĝ'etaj.

– Mi trovis ilin! – ek'kriis la knab'ino kaj lev'iĝis. – En-metu ilin!

– Sed vi ne rigardu, – petis la avino.

Sofia tenis la dent'aron mal-antaŭ la dorso.

– Mi volas rigardi.

Tiam la avino simple prenis la dentojn de ŝi kaj en-metis ilin en la buŝon.

– Kiam vi mortos? ² – demandis la infano.

– Post ne-longe. Sed tio vin ne interesas.

– Kial? – demandis la nep'ino.³

La avino ne respondis. Ŝi ek-iris laŭ inter-monta vojo.

— Tien vi ne iru! — ek-kriis Sofia.

La mal-jun'ul'ino respondis sen-zorge:

— Mi iras, tamen. Via patro dormas kaj nenion scias pri tio.

Ili trans-iris al alia flanko de la monto. La suno jam sufiĉe supren-iris. Estis bel'ege.

— Tiel mal-proksime mi ankoraŭ neniam estis — diris Sofia.

— Kaj vi?

— Ankaŭ mi ne — konsentis la avino.

Ili venis al la loko, kie la rokoj mal-supren-iris en la maron.

— Mi banos min — decidis la infano. Ĝi atendis mal-permeson, sed tiu ne sekvis. Do, ĝi sen-vest'iĝis mal-rapide kaj tim'eme, enmetis piedojn en akvon kaj ek-kriis:

— Mal-varma!

— Kompren'eble, ke mal-varma — re-diris la maljun'ul'ino.

Ŝiaj pensoj estis ie alie. — Kaj kion vi atendis?

La knab'in'eto en-iris la akvon.

— Naĝu! — vokis la avino. — Vi ja sci-povas naĝi.⁴

„Tie ĉi estas profunde, pensis Sofia.” Ŝi forgesis, ke mi ankoraŭ neniam sola naĝis en profunda akvo. „Ŝi el-iris el la akvo kaj ek-sidis sur la bordo.

Inter-tempe la suno ankoraŭ pli lev'iĝis. La maro lumis kaj brilis. aero estis mal-peza.

— Kaj mi sci-povas plongi — diris Sofia. — Ĉu vi scias, kiel estas, kiam oni plongas?

— Kompren'eble, ke mi scias — respondis la avino. — Oni lasas sin porti de la akvo.

— Kaj ĉiam kun mal-ferm'itaj okuloj?

— Kompren'eble. Neniu plongas kun ferm'itaj okuloj.

— Ĉu vi kredas, ke mi sci-povas tion, eĉ se mi ne montros tion al vi? — demandis la infano.

– Jes, jes – respondis la avino. – Vestu vin jam, por ke ni povu re-veni antaŭ ol la patro vek’iĝos.

Ŝi ek-sentis la unuan lac’iĝon. „Kiam ni re-venos hejmen”, ŝi pensis, „kiam mi estos de-nove hejme, tiam mi eble ankoraŭ iom dorm’etos. „Kaj mi devas ne forgesi diri al ŝia patro, ke tiu infano ankoraŭ ĉiam timas profundan akvon.”

1. tre mal-mola ter-peco / 2. ĉesi vivi / 3. fil’ino de filo aŭ de fil’ino / 4. trans-lok’iĝi en la akvo per movoj de la korpo.





VERDA RAKETO¹ DUDEK-JARA

En la bulgara urbo Vraca oni re-memoris en la jaro 1982 gravan okaz'aĵon: antaŭ dudek jaroj est'iĝis tie la unua lern'ej'ana Esperanto-societo² en la lando – Verda Raketo.

Pri la historio de la societo parolas ĝia fond'into kaj instru'isto de Esperanto, sinjoro Bojĉe Mladenov:

„En la jaro 1962 mi parto-prenis la XIII-an kongreson³ de Tutmonda Astronaŭtika Federacio en Varna. Tiam mi decidis komenci la instru'adon de Esperanto en mez-lern'ejo. Kial? En Vraca oni preparis por la sekva jaro tut-mondan kongreson de junaj esperant² istoj. Dum la lerno-jaro 1963-1964 mi en-kondukis Esperanton kiel ne-dev'igan stud-objekton en unu klason kaj unu-foje en semajno. Pli ol cent ge-lern'antoj de la 9-a, 10-a kaj 11-a klasoj lernis. Esperanton. Dum dudek jaroj de nia ekzist'ado pli ol 500 ge-lern'antoj parto-prenis diversajn Esperanto-kongresojn kaj aliajn kun-venojn en – kaj ekster-lande. Kiel gastoj⁴ rest'adis ĉe ni dekoj da esperant² istoj el Japanio, Sovet-Unio, Hungario, Jugoslavio, Usono, Finnlando kaj el aliaj landoj.”

La societ'anoj faris kaj sendis al pli ol 70 landoj multajn milojn da diversaj produktoj far'itaj propra-mane, ekz. kovertojn, ĉiujn kun la emblemo⁵ de Verda Raketo.

De la urba konsil'ant'aro en Vraca la societo ricevis 500 levojn⁶ kiel mon-helpon por sia plua ag'ado.

1. arte-far'ita: fajr'aĵo / 2. grupo / 3. granda kun-veno / 4. kiu vizitas / 5. prezent'anta ion per bildo / 6. bulgara mon-unuo.



Letero de la redakcio

Estimataj amikoj de Juna Amiko

sekvajn liniojn ni ŝatus adresi precipe al pedagogoj, instruistoj de Esperanto kaj literaturistoj, kiuj deziras iamaniere kunlabori al nia lerneja revuo, variigi ties enhavon per legindaj verkoj kaj tiamaniere kontribui al edukado de novaj adeptoj de la Internacia Lingvo.

Kiel vi eble rimarkis, post preskaŭ dujara paŭzo la Juna Amiko – sen esence modifi sian orientiĝon – reaperas per la tri antaŭ pasintjaraj numeroj (inkluzive tiun ĉi duoblan) kaj sub la nova redakto.

Ĉar la revuo estas destinita precipe por la komencantoj, nia unuavica pretendo estas verki en bona lingvaĵo kaj helpe de la vortprovizo, kiu ampleksas ne pli ol mil morfemojn (la novajn vortojn oni klarigas piednote). Interesatoj rajtas peti tiucele la t.n. bazan liston, ev. provekzemplerojn de la revuo.

Per kio kontribui? Bonvenas ĉio, kio estas interesa, speciale por la junularo kaj infanoj, kio karakterizas vivon kaj kulturon de diversaj landoj kaj popoloj (laŭeble plej multaj), ilian paseon kaj nuntempon. Aparte konvenas temoj priesperantaj. Artikoloj, rakontoj poemetoj – originalaj aŭ tradukitaj – estu laŭeble ilustritaj per fotoj aŭ desegnaĵoj. Maksimuma amplekso – ĉ.80 tajpitaj linioj

Kuriozaĵoj, krucenigmoj, kantoj, korespond-anoncoj humuro ks. estas konsista parto de la periodaĵo.

Al ĉiuj ĝisnunaj kaj venontaj kunlaborantoj koran dankon!

Via Oldřich Kníchal

koresp. adreso:

Budaörs

Patkó u. 3. II 19

H - 2040

Hungario

PER GAJAJ OKULOJ

Obe'ema

— En mia familio unu semajnon ordonas la edzino, la alian semajnon obeas¹ mi!

*

Inter vir'inoj

— Mia edzo mortis trian tagon post la ge-edz'iĝo.

— Do li ne suferis longe.

*

Kiu mal-satas

Si: Mi ne povas sat'iĝi per rigard'ado al printempa naturo.

Li: Mi tuj diris al vi, ke vi kun-prenu sandviĉojn,² sed vi ne volis.

*

Unua-klasa

Malgranda Jozefo estis unua-foje en la lern'ejo. Hejme li plendas al la patro:

— Vi diris, ke mi estos en la unua klaso. Sed tie estas nur lignaj benkoj!

*

Reciproke

Jun'ulo diras al jun'ul'ino:

— Kiel bela vi estas!

— Dankon, sed mi ne povas diri tion!

— Ne gravas. Mensogu³ kiel mi!

Kioma horo?

- Kioma horo estas?
- Dek minutoj post.
- Dek minutoj post kioma?
- Mi tute ne scias. Mi perdis la mal-grandan montr'ilon!

*

Gasto en restoracio:

- Bon-volu porti porcion⁴ da skrib-eraroj!
- Tion ni ne havas.
- Kial do vi havas ilin en la manĝo-karto?

*

Instru'isto al lern'anto:

- Nomu kelkajn grandajn riverojn de Sovet-Unio!
- Jes, kaj kiujn?



*

Ĉe benzin'ujo:

- Kiom kostas unu guto da benzino? ⁵
- Nenion.
- Tiam gutu⁶ al mi tridek litrojn!

Atentu! Ni bonvenigas kompetentajn tradukojn de la plej belaj naci-lingvaj porinfanaj poemoj en Esperanto de klasikaj kaj modernaj aŭtoroj. (Konvenas ankaŭ la jam ekzistantaj tradukoj). Bv. sendi kune kun la originala teksto kaj en du ekzempleroj al la redaktoro.

1. agi laŭ tio, kion alia persono ordonas / 2. manĝaĵo kun unu aŭ du pan-tranĉoj / 3. diri mal-veron / 4. peco da manĝo / 5. brul'aĵo en motoroj / 6. flu'igi po-iome.



Rigardu atente ambaŭ bildojn kaj provu trovi dek lokojn, per kiuj ili estas mal-samaj!



Bulgario: **Pavlina Nikolova Stojanova** (26j. infan-ĝarden'ist'ino), 7174-s Borovo, ul. Milju Radev 18, okr. Russenski * **Gjulten Osmanova Enrolova**, Ruse – 7005, kv. Zdravec bl. 18, B2 * **Biserka Velikova Marinova**, 7174 s. Borovo, okr. Russenski (muziko, poezio, turismo, franca lingvo) * **Margarita Georgieva Popova**, 7174 s. Borovo, okr. Russenski (21-jara, laboras en biblioteko, kor. pri poezio, turismo, muziko, pentro-arto).

Ĉeĥoslovakio: **Lenka Kusková**, Pod Lipou 1665, 508 01 Horice (16-jara lernant'ino; vojaĝ'ado, ski'ado, bild-kartoj) * **Radek Juza**, Boženy Němcové 1460, 508 01 Hořice (16-jara studento, pri la naturo, kolektas kalendarojn, bild-kartojn) * **Pavel Munzar**, Barakova 934, 508 01 Hořice (16-jara studento, pri la naturo, kolektas kalendarojn, bild-kartojn) * **Pavel Munzar**, Barakova 934, 508 01 Hořice (16-jara studento, pri radio-tekniko, elektro-tekniko, ŝak-ludo)

Sovetunio: **s-ro Vadim Alireev** 142300, g. Ĉechov, Moskovskaja obl., ul. Poligrafistov, d. 11 „b.“ kv. 514 (bild-kartoj, scienco kaj ĝia influo je la vivo kaj kulturo de hom'aro) * **Elena Tumanova**, 143952, g. Rentovo, Moskovskaja obl., ul. Lenina, d. 16, kv. 10 (nun-tempa germana literaturo) * **f-ino Galina Iljina**, 370119, g. Baku, Azerbajdĝanskaja SSR ras. 8 kilometr, d 3, kv. 36 * **Adomaitis Jonas**, 24 jara fraŭlo, 234431, Skirsnemune, Jurbarkas raj., Litovio, USSR (naturo, mu-

ziko) * **Petkevicius Sigitas**, 27jara radio-teknik'isto, 234430 Jurbarkas, Komjau-nimo 37, Litovio, USSR (fot'ado, naturo, arto) * **Miksta Eugenijus**, 26j. radio-teknik'isto, 234430, Jurbarkas, Revoliucijos 31b -61, Litovio (naturo, arto, muziko) * **Pinaitis Rimantas**, 23j. torn'isto, 234456 Girdziai, Ateities 3, Jurbarkas, Litovio USSR (sporto, aŭtoj, besto) * **Stalgys Rimas**, 25jara elektr'isto, 234430, Jurbarkas, Gagarino 20-2, Litovio (Esperanto-movado, naturo).

Algerio: **S-ro Abid Mohamed EL-AMINE** 5 Rue Henri Alexandre, Alger (romantiko, muziko).

Nigerio: **Joseph Richardson**, DNIL, PMB 21079, Ikeja-Lagos, popmuziko, futbalo. **Bangladeŝo:** **K.M.J. Haider-Sapon**, Changram, Bheramara, Kushtia, Bangladesh, bild-kartoj, poŝt-markoj, muziko.

Etiopio: **Haile Negash**, Addis Ababa, P. O. Box 40459, turismo, elektro-tekniko, Ankaŭ hungare.

Ghano: **S-ro Samiel Ofori**, Koforidua, P. O. Box 50, Ghana. Pri futbalo, muziko, tablo-teniso

Maroko: **Karim Boujida**, 269, El Karaouyenne – habitas Economiques, Berkane, Marocco; muziko, vojaĝado; kun 20-40 jaraj personoj.

Pakistano: **F-ino Farkhanda Afzal**, stud. C/O Sher Bahadar Mirza Vill e P.O. Dakki Teh. Charsada, N.W.F.P.

Usono: **Ricardo Wiman**, 4985 Holladay Boulevard, Salt Lake City, Utah

POR NIAJ LEGANTOJ

La distribuejo de la Hungara Poŝto informis nin, ke ekde nun JA estos aĉetebla en Budapeŝto nur en la subaj — pli grandaj — gazetvendejoj. Do, Budapeŝtaj esperantistoj estas petataj serĉi nian revuon nur en la gazetvendejoj ĉe la subaj adresoj (ĉiuj en Budapeŝto):

Adreso	Telefono
V. Váci út 10.	185-604
V. Szabadsajtó u. 6.	184-840
SUGÁR Üzletközpont Örs vezér tér	843-160/69
Magyar Jakobinusok tere Déli pu.	—
Szt. István krt 25.	314-334
I. Bem u. 9.	352-346
V. Felszabadulás tér 4. (Párizsi udvar)	181-401
József nádor tér 1.	185-850
CORVIN Áruház	335-551
Lenin krt. 17.	423-929
Hegedüs Gyula u. 43.	491-505
Baross u. 59.	131-286
SKÁLA Áruház	852-222/28
Petőfi Sándor u. 17.	189-013
Rákosfalva park 3/c (XV.)	847-274
Hírlapbolt (KHI)	
V. Bajcsy-Zs. u. 76.	116-269

SAĜ'ULO

Iu-tage Goha vidis, kiel riĉa sinjor'ino el-iris el sia ora vetur'ilo antaŭ vend'ejo de best-vend'isto. Por cent or-mon'eroj ŝi aĉetis mal-grandan mult-koloran birdon.

„Kiel oni povas doni por tia mal-granda besto tiom da mono? ”, demandis Goha la vend'iston. „Ŝi tiom amas la birdojn, ke ŝi pagas tre multe”, respondis la viro. Goha, do, prenis azenon, hundon kaj meleagron¹ kaj iris al la riĉa sinjor'ino.

„Hieraŭ mi vidis, diris al ŝi Goha,” ke vi aĉetis por cent or-mon'eroj mal-grandan birdon. Tial mi hodiaŭ al-portis al vi mir'-indajn bestojn. Tiu ĉi azeno sci-povas ludi kiel klaŭno². Kaj tiu ĉi hundo estas bona kun'ulo, se vi estas sola.” Sed pri la kvar-pied'uloj la sinjor'ino volis aŭdi nenion. Goha prezentis al ŝi la meleagron. „Rigardu, ĝi paŝas kiel sultano”.³ Fin-fine ŝi estis preta aĉeti la meleagron por kvin or-mon'eroj. „Sed kial”, demandis Goha. „Hieraŭ vi donis por mal-granda mult-kolora birdo cent or-mon'erojn kaj por tia ĉi bel'ega besto vi volas pagi nur kvin? ”

„Jes,” respondis la vir'ino. Tiu mal-granda besto estas papago, kiu sci-povas paroli. Tial ĝi estas tiel multe-kosta.”

„Tiam vi devus doni por mia birdo eĉ ducent or-mon'erojn. Ĉar dum via birdo babilas,⁴ la mia silentas kaj pensas!”

Tradukis kaj adaptis D. Berndt

1. kort-birdo kun bela vosto / 2. kiu faras gajan prezent'adon / 3. iama ŝtat-estro en Turkio / 4. multe kaj mal-saĝe parol'adi




JUNA AMIKO

Internacia Lerneja Esperanto-Revuo

de la Hungara Esperanto-Asocio (H-1368 Budapest, 5. Pf. 193.) Responda eldonisto: TIBOR VASKÓ Responda redaktoro: OSZKÁR PRINCZ Redaktoro: OLDŘICH KNÍČHAL (Budaörs, Patkó u. 3. II. 19. H-2040) Kunlaborantoj: D. Berndt (GDR), M. Boulton (Anglio), Y. Brion (Francio), J. Chvosta (Ĉeĥoslovakio), As. Grigorov (Bulgario), R. Grinšpan (Sovetunio), V. Heimlich (GFR), A. Kubulnieks (Sovetunio), R. Okumura (Japanio), s-ino Ósz (Hungario), B. Ragnarsson (Islando), E. Raveloson (Madagaskaro), s-ino Saranath (Hinda Unio), T. Sekelj (Jugoslavio), J.H.Sullivan (Anglio), s-ino M. Turin (Francio), J. Zágoni (Rumanio), W. Zytynski (Pollando), Grafikistoj: J. Klement, P. Rak. (Ĉeĥoslovakio), S. Plugor (Rumanio), s-ino E. Váli (Hungario). Lingva kontrolo: A. Leinhardt (Francio).

Minisztertanács Tájé. Hiv. –
III. (IFJ) 30/1976.

HUMURO



Murd'ist'ino!²

Aŭskultu, ĉu vi ne konas ion
kontraŭ tusado¹ de mia besto?



1. bru'ege el-spiri / 2. kiu mort'igas